



Nuvola di Capua

PACO POR VIVI
GANDHI
EINSTEIN
en **DIALOGO**



FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA - MILANO
2012

Titolo originale: *Pace per vivere. Gandhi Einstein in Dialogo*
Copyright 2006 MC Editrice sas
Immagini di copertina (tratte dall'originale): *Agostino Carabelli*
per gentile concessione di MC Editrice, www.mceditrice.it

Elitaligis: *Ida Bossi*
Traduko lingve kontrolita de: *Giovanni Daminelli, Carlo Sarandrea*
Enpaĝigis: *Giovanni Daminelli*

[*Itala Esperanto-Frederacio*](#) (Milano)

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

MOHANDAS KARAMCHAND GANDHI

Mi estas timema,
sed mi devas konfesi,
ke mia timemo
estas al mi tute avantaĝa,
ĉar ĝi instruas al mi la ekonomion de la vortoj.

Mi laboris kiel advokato,
malbela metio,
multe da ŝajno
malmulte da scienco.

Kiel advokato mi lasis Hindujon
por trovi laboron en Sudafriko.

Dum la ŝipo atingis la kajon
kaj mi observis la homojn,
mi tuj konstatis, ke la hindoj
ne ĝuas grandan konsideron.

En tribunalo la prokuroro
ordonis al mi demeti la turbanon.
Mi rifuzis kaj forlasis la tribunalon.

La sepan aŭ okan tagon
mi veturis al Pretorio per trajno.
Mi mendis sidlokon en la unua klaso.
Pasaĝero envenis,
rigardis min de kapo ĝis piedoj,
li vidis, ke mi estas neblankulo,
foriris kaj revenis kun du funkciuloj.

“Foriru. Vi devas iri en la varvagonon.”

“Sed mi havas unua-klasan bileton.”

“Ne gravas. Mi diras al vi, ke vi devas iri en la varvagonon.

Vi devas forlasi la kupeon,

aŭ mi venigas policanon,

kiu forpelos vin ...”

“Venigu lin laŭplaĉe.

Mi rifuzas foriri miavole.”

La policano alvenis,

forpelis min;

oni konfiskis mian pakaĵaron.

Mi komencis pensi pri mia devo.

Tiu ĉi akcidento estas bagatela,

ĝi estas nur simptomo

de la grava malbono de la antaŭjuĝoj.

Estis ĉiam mistero laŭ mi,

kiel homoj povas sin senti honorataj

per humiligo de siaj similuloj.

Kiam mi estis en Sudafriko jam de tri jaroj

kaj mi havis sufiĉe bonan klientaron,

mi decidis iri hejmen,

konduki mian edzinon kaj infanojn

por reveni

kaj kune ekloĝi tie.

Tiutempe

mi kredis, ke

por aspekti civilaj

nijaj vestoj kaj nia sinteno

devus simili kiel eble plej multe

al la eŭropa modelo.

Do mi aranĝis la stilon de la vestaĵoj
de miaj edzino kaj infanoj.
Kun la sama spirito
kaj eĉ pli granda malinklino,
ili alkutimiĝis uzi manĝo-tranĉilojn kaj forkojn.
Kiam mia fanatika entuziasmo
por tiuj ĉi simboloj de civilizo malaperis,
ili rezignis je la tranĉiloj kaj forkoj
kaj kondukis denove laŭ la originaj manieroj.

Hodiaŭ mi povas konstati,
ke ni nin sentas multe pli liberaj kaj senzorgaj
pro tio, ke ni forĵetis la komplikaĵojn de la “civilizo”.

ALBERT EINSTEIN

*Lasu, ke mi diru al vi, kian aspekton mi havas:
palan vizaĝon, longajn harojn
kaj ioman ventron.*

*Mi havas malelegantan irmanieron,
cigaron enbuŝe
kaj plumon enpoŝe aŭ enmane.*

*Malrektajn krurojn aŭ tuberojn mi ne havas,
do mi estas sufiĉe belaspekta.*

*Mi eĉ ne havas harojn sur la manoj
kiel ofte malbelaj homoj havas.*

*Estas do domaĝe,
ke vi ne vidis min.*

*Mi ŝatas
nek novajn specojn de manĝaĵoj
nek novajn vestaĵojn.
Estus vere bedaŭrinde, se la tegaĵo
estus pli belaspekta ol la karno,
kiun ĝi envolvas.*

*Mi atingis aĝon,
en kiu mi ne estas plu devigata surmeti ŝtrumpetojn
kvankam oni diras al mi, tion fari.
Kiam mi estis knabo mi konstatis,
ke la pieda dikfingro
ĉiam boras la ŝtrumpetojn.
Mi ĉesis surmeti ilin.*

*Se mi devus zorgi pri mia aspekto,
mi ne plu estus mi mem...
Mi daŭre ne zorgos pri tio,
ĉar certe ĉi tio donas al mi la avantaĝon
esti lasata en paco
de multaj dandoj,
kiuj alikaze venus viziti min.*

*Se vi taksas min tiom abomena,
serĉu amikon pli allogan.*

*En mia manĝoĉambro
mi ne metos alion escepte de
unu tablo el pino, unu benko kaj kelkaj seĝoj.*

*La banalaj objektoj
kiujn strebas havi la homoj,
la posedo de havaĵoj,
la ŝajna sukceso, la lukso
ĉiam ŝajnis al mi malestimindaj.*

*La riĉeco kaj la feliĉo
neniam ŝajnis al mi
celo absoluta.*

Tio estus moralo, kiun mi difinus “de porkejo”.

*La idealoj, kiuj lumigis mian vojon
kaj ĉiam donis kuraĝon al mi
por alfronti la vivon kun gajeco,
estis la amaj rilatoj, la beleco kaj la vero.*

*Mi klopodis iĝi,
ne homo sukcesa,
sed homo valora.*

***Mi kredas, ke simpla
kaj senpretenda vivo
bonon faras al ĉiuj,
al la korpo kaj al la menso.***

Jes, ĉar
la plejmulto el ni,
anstataŭ resti la mastro
de siaj sensorganoj,
fariĝas ilia sklavo.

La korpo suferas damaĝon,
ĉiufoje ke oni manĝas troe,
kaj la damaĝon oni povas rebonigi, parte,
nur per fasto.

Neniu el miaj rimarkoj
devas timigi vin,
nek konduki vin al malespero
tiel ke vi rezignu je la klopodo!

La votpromeso pri io
ne signifas, ke ni povas plenumi ĝin
rigore ekde la komenco;
ĝi signifas male,
ke ni devas daŭre streĉiĝi
per penso, per vortoj kaj per agoj
por plenumi la faritan promeson.

Samkiel antaŭ ol realigi sciencajn eksperimentojn
necesas viziti kurson
pri scienco,
tiel necesas
antaŭprepara, rigora disciplino
por kvalifiki iun preta por fari eksperimentojn
en spirita kampo.

La fasto estas utila, sed nur
kiam la menso kunlaboras kun la malsatanta korpo.
Kaj la civilizo ne konsistas el la multobligo
sed el la propravola kaj libervola malpliigo de la bezonoj.
Nur ĉi tio alportas feliĉon kaj veran kontentigon
kaj pligrandigas la taŭgecon servi la aliajn.

Anstataŭigu la avidecon per la amo
kaj ĉio iros bone.

*Ho juneco,
vi scias, ke viaj ardaĵaj deziroj
realiĝos*

***nur se vi kapablas ami kaj havi komprenemon
por homoj, bestoj, plantoj kaj steloj.***

*Tiel ĉies ĝojo estos via ĝojo,
kaj ĉies doloro via doloro.*

*Malfermu viajn okulojn, vian koron, viajn manojn
kaj forigu tiun venenon,
kiun viaj praavoj suĉadis
tiel avide el la historio.*

*Nur tiam la tuta mondo
iĝos via patrujo
kaj via laboro kaj viaj streĉoj
dissemos benojn.*

***Pere de la amo realiĝas
la plej rekta eniro al la vero...***

*Koncerne la serĉadon de la vero
miaj lacigaj esploroj
kun multaj senelirejoj
montris al mi
kiom estas malfacile
fari sekuran antaŭenpaŝon
eĉ malgrandan
en la kono
de tio, kio estas vere esenca.*

Kio estas la vero?
Malfacila demando ĝi estas,
kiun mi mem solvis
dirante, ke ĝi estas tio, kion la interna voĉo diras al ni.
La silenta malgranda voĉo ene de ni
devas esti ĉiam la decida juĝisto,
kiam estas konflikto de devoj.
Ĉio, kion vere humile mi povas malkaŝi al vi
estas, ke neniu trovas la veron
se li ne posedas grandan senton de humileco.

Por vidi la veron
vi devas nuligi,
vero estas tio, je kio en certa momento ni kredas
kaj ĉi tio estas nia dio.
Se oni respektegas ĉi tian partan veron,
oni estas certaj atingi,
kun la paso de la tempo, la absolutan veron, nome, Dion.
Sed estas neeble, ke ni atingu la veron
dum ni estas enprizonigitaj
en ĉi tiu mortema korpo.
Ni povas bildigi ĝin al ni nur per imagemo.

Ne estas beleco, forlasante la veron.

Aliflanke, la vero povas montri sin
en formoj, kiuj ekstere
povas esti ne tute belaj.
Sokrato, oni diras,
estis la plej verema homo en sia epoko,
tamen, oni rakontas, ke liaj trajtoj
estis la plej malbelaj en Grekujo.

Laŭ mi li estis bela,
ĉar lia tuta vivo
estis batalo
por atingi la veron.

*Mi estas tute certa,
ke ĉiuj riĉaĵoj de la mondo,
ne povus helpi la homaron,
eĉ se ili estus en la manoj de homo
komplete dediĉita al bonaj celoj.*

***Nur la ekzemplo de grandaj kaj puraj personecoj
povas gvidi al noblaj pensoj kaj faroj.***

*La mono favoras nur egoismon,
kaj ĝi konsistigas por ĝia posedanto
nerezisteblan tenton
uzi ĝin malbone.*

*Ĉu oni povas imagi Moseon, Jesuon aŭ Gandhi'n
havantajn la miliardojn de Carnagie?*

*Gandhi...
la plej granda genio de nia epoko.*

*Gandhi elmontris je kiaj rezignoj
kapablas la homo,
kiam li trovas la ĝustan vojon.*

Ne: tio, kion mi, kun streĉiĝo kaj turmentado,
klopodis atingi, estas nur
la realigo de mi mem,
vidi Dion vidalvide,
mian liberecon.

Mi ŝatus rakonti miajn eksperimentojn
en la spirita kampo
el kiuj mi ĉerpis la forton
por agi en politika kampo.

Mi ne depostulas nenion pli ol tio,
kion depostulas sciencisto
(kiel Albert Einstein),
kiu farante siajn eksperimentojn,
kun plej granda zorgo,
ne postulas por siaj konkludoj
ian definitivan karakterizon.

Mi diros al vi,
persone mi taksas min nekapabla
malami iun ajn estaĵon surtere.
Dank' al longa praktikado
de disciplino kaj preĝo,
antaŭ kvardek jaroj
mi ĉesis malami ĉiun ajn.

Sed mi povas malami,
kaj mi malamas la malbonon, kie ajn ĝi estas.

Mi malamas la reg-sistemon,
kiun la angloj starigis en Hindujo,
mi malamas la senkompatan ekspluatadon de Hindujo
tiel, kiel mi malamas profunde en la koro
la hororan sistemon de la netuŝebleco
pri kiu milionoj da hindoj
fariĝis respondecaj.

Sed mi ne malamas la tiranajn anglojn
tiel, kiel mi rifuzas malami
la tiranajn hindojn.
Mi klopodas reformi ilin per ĉiuj amoplenaj manieroj,
laŭ mia povebleco.

*La vera valoro de homo
estas ĉefe difinita
de la maniero, per kiu li atingis
liberiĝon el sia egoo.*

*Vivo, kiu celas antaŭ ĉio
kontentigi personajn dezirojn,
pli aŭ malpli frue kondukas al amara elreviĝo.*

*La homa vivo havas signifon
nur se ĝi kontribuas
por igi la vivon de ĉiu kreitaĵo
pli nobla kaj bela.*

*Jes, nur vivo travivata por la aliaj
estas vivo, kiu valoras la penon vivi.
La kundivido de alies suferojn kaj ĝojojn,
devas gvidi nin.*

*Kaj ekzistas ununura vojo,
kiu kondukas la homojn al la vera homa grandeco:
la malmola lernejo de la malfeliĉo.*

*Sed la nacioj ignoras la historion,
la malbelaj lecionoj
ĉiam estas denove lernendaj.*

*Luj personoj, ne la mar-malsano,
naŭzas min ... sed ... mi timas, ke la scienco
devos ankoraŭ trovi rimedon
por ĉi tiu mia ĝeno.*

*Ha! Pro mia famo mi fariĝas pli kaj pli stulta...
fenomeno, kiu estas... sendube tre komuna!*

*Ni devas fari nian plejbonon,
ĉi tiu estas nia sankta respondeco
kiel homaj estaĵoj.*

*Estas kurioza la situacio sur la tero.
Ĉiu el ni
estas ĉi tie por mallonga vizito...
Ni ne scias kial,
sed kelkfoje
ni ŝajnas ekvidi celon.*

*Kiu estas la signifo de la homa vivo
kaj pli ĝenerale
de la vivo de ĉiu kreitaĵo?*

*Kiu ne donas signifon
al sia propra vivo
kaj al tiu de aliaj kreitaĵoj,
tiu estas ne nur malfeliĉa,
sed ankaŭ mallerta en la vivo.*

*La etika sinteno de la homo
devus baziĝi aktive
sur la solidareco, la edukado,
sur ligiloj kaj bezonoj sociaj.
La homo estus tro limigita estaĵo,
se estus necese lin kontroli
per minaco de puno
kaj espero de rekompenco post la morto.*

***Mi ne povus imagi dion,
kiu premias kaj punas siajn kreitaĵojn,
kaj kies celoj estas konformaj kun la niaj,
unuverte, dion,
kiu estas simpla respegulo
de la homa malforteco.***

Lasu min klarigi;
kiel mi komprenas la religion.

Ĝi ne estas la hindua religio aŭ tiu kristana aŭ alia
sed la religio, kiu transcendas ĉi tiun aŭ tiun religion,
la religio, kiu transformas nian propran naturon,
kiu ligas nin nemalligeble
kun la vero, kiu estas en ni,
kiu ĉiam purigas nin
kaj lasas la animon tute maltrankvila
dum ĝi ne trovas sin mem.

Ĝi estas mistera nedifinebla forto,
kiu trapenstras ĉion.
Mi sentas ĝin, eĉ se mi ne vidas ĝin,
ĝi defias ĉiun elmontron,
ĉar ĝi estas tiom malsama,
ol tio, kion mi kaptas per la sensoj.

Mia religio
konsistas el humila admirado de la Spirito
senfine plej alta,
kiu sin montras en la malmulto, kiun ni
per nia malforta kaj efemera racio
povas kompreni pri la realo.

Sufiĉas al mi kontempli
la misteron de la sent-kapabla vivo,
kiu pludaŭras en la eterneco,
prikonsideri la mirindan strukturon de la universo,
pri kiu ni komprenas apenaŭ malmulton,
kaj klopodi humile kompreni
eĉ minimuman parton de la inteligento,
kiu malkaŝas sin en la naturo.

Ĉiu, kiu serioze sin dediĉas al la scienco,
tre frue konvinkiĝas,
ke en la naturaj leĝoj
montriĝas spirito
senmezure pli granda ol tiu homa.

Se Dio kreis la mondon,
ni ne povas diri,
ke li tro zorgis
por faciligi ĝian komprenon.

*Kiom estas malfacile
sukcesi doni nur ekrigardon
al la ludkartoj de Dio!*

*Sed mi ne kredas eĉ por nur unu momento,
ke li ludas ĵetkubojn.
Mi estas nekredanto
profunde religia.
Iamaniere
tio estas nova tipo de religio.*

*Aliflanke,
la scienco sen religio estas lama
kaj religio sen scienco estas blinda.
La plej belaj ideoj de la scienco
fontas el profunda religia sento.
Mi pensas, ke ĉi tiu religiemo
estas la sola religia kreiva sperto
de nia epoko.*

*La mia estas la dio de Spinoza,
kiu sin montras en la harmonio de ĉio, kio ekzistas.*

***Ĉio estas difinita de fortoj
sur kiuj ni havas nenian
regadon. Tiel estas por la insekto,
kiel por la steloj. Homaj estaĵoj,
vegetaloj aŭ kosma pulvo,
ni ĉiuj dancas ritme
de mistera muziko
ludata en foreco
de nevidebla flutisto.***

Ekde mia juneco
mi lernis la arton taksi la valoron de la sanktaj skriboj
surbaze de ilia etika instruado.
Mirakloj ne interesas min.
Mi ribelas al ortodoksa kristanismo,
ĉar mi konvinkiĝis,
ke ĝi distordis la mesaĝon de Jesuo.

Memkompreneble ekzistas noblaj, kvankam raraj, esceptoj.
Ni supozu, ke kristano venas al mi
kaj diras al mi ke li estas allogita
de la legado de *Bhagavad-gita*
kaj li volas fariĝi hinduo,
mi respondus
ne, kion *Bhagavad-gita* proponas,
tion ankaŭ la Biblio proponas.
Vi ne strebis por malkovri tion!
Streĉiĝu por tio
kaj estu bona kristano.

*Se la fideluloj de la nunaj religioj
vere volus pensi kaj agi
laŭ la spirito de la fondintoj de ĉi tiuj religioj,
tiam ekzistus nenia malamikeco
kaŭzita de la religio
inter la sekvantoj de malsamaj kredoj.
Eĉ la konfliktoj
en religia kampo
fariĝus sensignifaj.*

La religioj
estas malsamaj vojoj
konverĝantaj al la sama punkto.

Estas pli bone,
ke nia vivo parolu por ni
prefere ol niaj vortoj.
Dio elportis krucon ne nur antaŭ 1900 jaroj,
sed li elportas ĝin ankoraŭ nuntempe
kaj mortas kaj resurektas tagon post tago.

Do ne prediku la dion de la historio,
sed montru lin tiel, kiel li vivas hodiaŭ en vi.

*La instruadoj de Kristo
estas tiel simplaj,
tamen, post preskaŭ du mil jaroj,
ili ankoraŭ ne unuarangas ĉe la homoj.*

*Ekde la infaneco ni lernu
plezuriĝi pri la feliĉo kaj la ĝojo
de niaj kunuloj
kaj ne plezuriĝi pri la malfeliĉa batalo
de la homo kontraŭ la homo.
Se ĉi tiu natura sento
trovos lokon en nia koro,
ĉia malfacilaĵo de la vivo
fariĝos pli malpeza
aŭ almenaŭ pli eltenebla
kaj ni disvastigos ĝojon ĉien.*

Temploj aŭ moskeoj aŭ preĝejoj:
mi ne faras distingon
inter ĉi tiuj malsamaj loĝejoj de dio.
Ili estas tiaj, kiajn la kredo ilin faris.

Ili estas respondo al la deziro de la homo
atingi iamaniere la Nevideblon.

Mi ne kredas je la ekskluziva vero de la Vedoĵ,
la sanktaj hinduaj libroj.
Mi opinias, ke la Biblio, la Korano kaj la Zen-Avesto
estas same die inspirataj kiel la Vedoĵ.

Mia kredo je la hinduaj skriboj
ne postulas, ke mi akceptu ĉian vorton kaj ĉian version
kiel die inspiritajn.
Mi rifuzas esti kunligata
al ĉia interpretado
kiom ajn klera ĝi povas esti,
se ĝi forlogas de la racio aŭ de la morala sento.

Ĉia ajn tradicio,
kiom ajn malnova ĝi estu,
kiu ne kongruas kun la moralo
devas esti elpelata de la lando. Ekzemple
la netuŝebleco, kaj multaj aliaj hororaj kredoĵ
kaj religiaj praktikoj.
Se mi povus, mi forigus ilin ĉiujn.
Mia religio ne estas penetrebla
de aroganteco, orgojlo pro raso, religio kaj koloro.
Dio loĝas en nia koro.

**Mi ne konas pli grandan pekon
ol subpremi senkulpulojn
en la nomo de dio.**

Tamen, estas bele paroli pri dio
dum ni sidas ĉi tie
post agrabla matenmanĝo
kaj atendente des pli bonan tagmanĝon,
sed kiel mi povas paroli pri dio
al la amasoj, kiuj devas sin vivteni
eĉ sen taga manĝo?
Al ili dio povas aspekti nur kiel pano kaj butero.

Mia vivo estas nedisigebla tutaĵo
kaj ĉiuj miaj okupoj
kunfandiĝas unu en la alia
kaj ĉiuj naskiĝas
el mia nesatigebla amo por la homaro.
Ununura estas la homaro
ĉar ĉiuj estas egale submetitaj al la morala leĝo.
Ĉiuj homoj estas egalaj
antaŭ la okuloj de Dio.
Evidente estas diferencoj
de raso, de kondiĉo kaj tiel plu
sed ju pli alta estas la kondiĉo de iu homo,
des pli granda estas lia respondeco.

Mi celas
amikecon kun la tuta mondo
kaj mi povas akordigi la plej grandan amon
kun la plej severa opozicio kontraŭ maljusteco.

Mia politika agado
kiel ĉiuj aliaj miaj agoj
fontas el la religio.
Mi ne povus vivi religian vivon
se mi ne identigus min
kun la tuta homaro
kaj mi ne povus fari tion
se mi ne okupiĝus pri politiko.

*Amiko mia,
politiko estas pli malfacila ol fiziko!*

*La politikestroj
nepre devas esti
ĉiuj malsanecaj,
ĉar normala persono
ne povus elteni
tiajn respondecojn
sen kapabli,
antaŭvidi la postsekvojn
de siaj decidoj kaj agoj.*

*Mi estas “soleca vojaĝanto”
neniam mi sentis min apartenanta
nek al la hejmlando, nek al la geamikoj
kaj eĉ ne al la plej proksimaj parencoj.
Eĉ fronte al ĉi tiuj ligitecoj
mi ĉiam havis la fortan impreson
esti fremdulo
kaj mi ĉiam sentis bezonon de soleco.*

*La loko elektita por loĝi
ne estas tiom grava.
Mi mem senĉese vagadis
de unu loko al la alia
ĉie fremdulo...*

Nun mi estas en Usono.

*Estas obskura punkto
en la socia perspektivo de la usonanoj,
jes, ĉar ilia sento de egaleco kaj de homa digno
estas esence limigita
al la blankuloj.*

*La apartigo inter hebreoj kaj ne hebreoj
estas eĉ pli rimarkinda en Usono
ol en okcidenta Eŭropo.
Ju pli mi sentas min usonano,
des pli mi afliktiĝas pro ĉi tiu situacio.*

*Estas epokoj
en kiuj la monda etoso
kuraĝigas la moralon,
kaj la homoj fidas unu la alian
kaj faras la bonon.
En aliaj epokoj estas malsame.
Kiam la homoj vivas en epoko de konfuziĝo,
kiam estas streĉiĝoj kaj malstabilecoj
ili mem fariĝas malekvilibraj
kaj povas sekvi frenezan kondukanton.*

*Preskaŭ neniam mi sentis min
fremda rilate al la homoj kiel nun.*

*La plejmalbono estas, ke nenie troviĝas io
en kiu identiĝi,
la brutaleco kaj la mensogo estas ĉie.
Kiam la ŝtato superregas la unuopulon
kaj faras lin ilo senigita je propra volo,
oni perdas la plej altajn valorojn.*

*La ŝtato estas farita por la homo,
ne la homo por la ŝtato.
La ŝtato devus esti nia servisto
kaj ne ni la sklavo de la ŝtato.
Mi neniam faros ion
kontraŭ mia konscienco
eĉ se la ŝtato petus tion de mi.*

*Mia politika idealo estas la demokratio
kaj dum mi povos elekti,
mi vivos nur en lando
en kiu validas politika libereco,
tolero kaj egaleco de ĉiuj civitanoj
antaŭ la leĝo.*

***Esti toleremaj
ne signifas esti indiferentaj
fronte al la agoj kaj la sentoj de la aliaj.***

*Necesas ankaŭ komprenemo
kaj persona implikiĝo.*

*Finfine
ni ĉiuj estas
homaj estaĵoj,
malmulte gravas ĉu usonanoj aŭ germanoj,
hebreoj aŭ aligentanoj.
Se ĉi tiu sinteno estus adoptita,
kiu cetere estas la sola konvena,
mi vere estus feliĉa homo.*

*Mi trovas tre malagrabla,
ke la disiĝoj laŭ naciecoj
kaj kulturaj tradicioj
efikas tiel decide
en la ĉiutaga vivo.
Sed, se ni ne povas ŝanĝi la realon,
almenaŭ ni klopodu ne ignori ĝin.*

*Mi kredas, ke Gandhi
havas pli helan vizion
ol ĉiuj nuntempaj politikistoj.
Ni devus klopodi
agi laŭ lia spirito,
ne uzi perforton
batalante por nia afero
kaj rifuzi partopreni
en ĉiu iniciato,
kiun ni kredas celanta la malbonon.*

La aferoj irus tre trankvile
se oni povus determini
la disvolviĝon de siaj agoj
tute nur surbaze de unu sola ĝenerala principo.
Sed mi ne kapablas memori unu solan agon,
kiu povis esti determinata tiel facile.

Ju pli mi pripensas la pasintecon,
des pli vive mi komprenas miajn limojn.

Ĉio, kion mi depostulas de mi mem,
estas ke senĉese mi klopodu
kompreni la implikiĝon
de grandaj idealoj, kiel la *ahimso*, la neperforto

**kaj praktiki ilin
per penso, parolo, ago.**

Sed mi scias, ke mi devas ankoraŭ laŭiri
tre longan vojon
al ĉi tiu direkto.

Kiam la boera milito estis deklarita
miaj personaj simpatioj
direktiĝis ĉiuj al la boeroj,
sed tiam mi pensis, ke Hindujo povus akiri
la plenan emancipiĝon
nur ene kaj pere de la brita imperio.
Tial mi kunmetis la plej grandan nombron da kunuloj
kaj kun grandega malfacileco mi akiris,
ke ties servoj estu akceptitaj
en la ambulanca fako.

Ankaŭ post kiam mi jam loĝis en Johannesburg,
abrupte okazis io neantaŭvidebla,
la eksplodo de la zulusa “ribelo” en Natal.
Mi havis nenian malamon kontraŭ la zuluoj,
sed iam mi pensis, ke la brita imperio
ekzistas por la prospero de la mondo.

Alveninte al la scenejo de la ribelo
mi vidis, ke estis nenio,
kiu pravigis la difinon “ribelo”.
Oni nomis ĝin tiel,
ĉar zulusa ĉefo
rekomendis ne pagi
novan imposton truditan al sia popolo.
Mia koro estis kun la zuluoj
kaj kiam mi alvenis al la ĝenerala kvartiro
mi ĝojis ekscii, ke nia ĉefa okupo
estos kuraci la zuluojn vunditajn.
La blankuloj ne volonte flegis
la vunditajn zuluojn.
La zulusa ribelo estis riĉa je novaj spertoj
kaj multe pensigis min.

La milito kontraŭ la boeroj ne malfermis
miajn okulojn pri la hororoj de la milito
kun tia klareco, kia la “ribelo” malfermis ilin.

Ne estis milito
sed hom-ĉasado.

Aŭskulti ĉiumatene sciigojn pri la pafadoj,
kiujn la soldatoj pafis kvazaŭ petardojn
senkulpaj vilaĝoj
kaj vivi tie ene,
estis kruco.

Sed mi eltrinkis la maldolĉan kalikon
precipe ĉar la okupo de mia fako
konsistis ĉefe el flegado de vunditaj zuluoj
kaj mi vidis, ke se ni ne estus tie,
ili ne povus esti flegataj.

La milito estis deklarita la 4an de aŭgusto 1914.
Mi ricevis la ordonon reiri hejmen tra londona vojo.
Mi aŭdis, ke la hindoj
rezidantaj en Anglujo
devis partopreni en la milito.

Ni ĉiuj agnoskis la malmoralecon de la milito.
Estis tre klare al mi,
ke la partopreno en la milito
ne akordiĝis kun la *ahimso*, la neperforto.
Sed ne ĉiam oni sukcesas kompreni
siajn devojn kun la sama klareco.

Tiam, kiel hodiaŭ, mia abomeno kontraŭ la milito estis forta.
Sed la vivo ne estas simpla rekta linio,
ĝi estas fasko da devoj
tre ofte konfliktantaj inter si
kaj daŭre oni estas instigataj
elekti inter unu devo kaj la alia

Hodiaŭ mia starpunkto
estas tute malsama
kaj mi ne partoprenus en la militoj
kaj mi riskus la kaptitecon
kaj eĉ la eŝafodon
se mi estus devigata mankapti la armilojn
aŭ partopreni alimaniere en militistaj operacoj.

Milito estas ĉiam maljusta,
ĝi estas absoluta malbono.

**Mi firme kredas, ke la libereco
akirita per sangoelverŝado aŭ mistifiko
ne estas libereco.**

*La milito ne estas salon-ludo
en kiu ĉiuj respektas la regulojn.
Kiam temas pri vivo aŭ morto,
la reguloj ne plu valoras.
Nur la malakcepto de la milito
povas esti utila.*

*Laŭ mia vidpunkto
mortigi en batalo
tute ne estas pli bone
ol tutsimple murdi.*

*Mi opinias, ke la plej granda misio de la ŝtato
estas la protektado de la unuopulo
kaj doni al li la eblecon
evoluigi sian personecon.
La ŝtato malobservas ĉi tiun principon,
kiam ĝi trudas la soldat-servon.*

*Mi ne kaŝis,
nek private nek publike,
mian indignon pri la deviga rekrutado
ĉu en paco-tempo ĉu en milito-tempo.
Mi taksas mian konsciencan devon
batali per ĉiu rimedo
kontraŭ ĉi tiu barbara subpremo de la homa estaĵo.*

*La plej malbona frukto de la grega vivo
estas la militista vivo, kiun mi abomenas ...
Ĉi tiun lepron de la civilizo
oni nepre devas nuligi kiel eble plej baldaŭ.*

*Kiom mi malamas
la alkomanditan heroecon,
la sensencan perforton,
la malindan absurdajon, nomatan patriotismo!*

*Ni devas dediĉi la vivon
al la sekigo de milito-fonto:
la armil-fabriko.*

*Ĝis kiam oni celas la sekurecon
per armiloj,
neniu lando emas
rezigni armilon,
kiu ŝajnas promesi venkon
kaze de milito.
Laŭ mi, oni atingas la sekurecon
nur rezignante la tutan militistan nacian defendon.*

*Ni sciencistoj,
kies tragika destino
estis helpi la konstruon
de ekstermantaj iloj
pli kaj pli hororaj kaj efikaj,
devas taksi nian devon
solenan kaj plejaltan
fari ĉion, kio estas en nia povo
por malebligi, ke ĉi tiuj armiloj
estu utiligataj por la brutalaj celoj
pro kiuj ili estis inventitaj.*

*Tamen la respondeco
apartenas al kiu uzas ĉi tiujn novajn ilojn,
kaj ne al tiuj, kiuj kontribuas
al la progreso de la scienco.
Do ĝi apartenas al la politikistoj
ne al la sciencistoj.*

*La demando estas:
ĉu ekzistas maniero
por liberigi la homaron
el la minaco de la milito?*

*Kun la progreso de la moderna scienco,
trovi solvon pri ĉi tiu problemo
fariĝis afero de vivo aŭ de morto
por tia civilizo, kian ni konas.
Tamen ĉiu klopodo por solvi ĝin
finiĝis per mallaŭdinda fiasko.*

*Mi apelacias al ĉiuj viroj kaj al ĉiuj virinoj,
ne gravas ĉu humilaj aŭ potencaj,
por ke ekde nun ili sin devontigu
ne kontribui
al la milito nek al ĝia pretigo.*

*Pacismo, kiu ne aktive batalas
kontraŭ la naciaj armadoj,
estas senpotenca kaj meritas resti tia.*

*Mi estas aktiva pacisto,
sed ne absoluta.
Ĉi tio signifas,
ke mi malfavoras la uzon de perforto
en ia ajn cirkonstanco
krom kontraŭ malamiko,
kiu celas la detruon de la vivo
kiel celon per si mem.*

Mi scias, ke ne ĉiuj kredas je la neperforto
laŭ mia maniero kredi je ĝi.
Sed ne estas eble igi neperforta
personon aŭ socion
per nura devigo.

La neperforto agas mistere,
por mi ĝi ne estas simpla filozofia principo,
ĝi estas regulo kaj spiro de mia vivo.

La unua kondiĉo de la neperforto estas la justeco
ĉie, en ĉiu apartaĵo de la vivo.
Laŭ mi la ekonomia strukturo de la mondo
devus esti tia, ke neniu suferu
pro malabundo de nutraĵo kaj de vestaro.

Ĉiu devus havi sufiĉe da laboro
por sin vivteni.
Kaj ĉi tiu idealo povas esti realigata
nur se la iloj por produktado
de la bazaj vivrimedoj
estas libere alireblaj de ĉiuj
tiel, kiel okazas aŭ devus okazi
por la aero kaj la akvo de Dio.
Ili ne devus fariĝi
ilo de komerco
celanta al ekspluatado de aliaj.

Se ĉiu posedus nur tion, kio estas bezonata de li,
neniu estus malriĉa
kaj ĉiuj vivus kontentigitaj.
Sed, tiel iras la aferoj,
la riĉuloj estas nekontentaj same kiel la malriĉuloj.
La malriĉulo deziras iĝi milionulo
kaj la milionulo plurmilionulo.

Labori por la ekonomia egaleco
signifas forigi la eternan konflikton inter kapitalo kaj laboro.
Neperforta regad-sistemo
estas evidente neebla
kiam daŭre ekzistas la profunda abismo
inter riĉuloj kaj la amaso da malsatuloj.

*Neniam mi estis komunisto
tamen se mi estus, mi ne hontus.*

Kio estas la kaŭzo de la nuna ĥaoso?
La ekspluatado
ne nur de la nacioj pli malfortaj
fare de la pli fortaj,
sed ankaŭ fare de la frataj nacioj.
Kaj la maŝinoj,
ebligis al ĉi tiuj nacioj
ekspluati la aliajn.

Mi estas kontraŭ la “frenezo” de la maŝino
ne kontraŭ la maŝino per si mem.

**Nuntempe la maŝino utilas nur
por grimpigi la malmultajn
sur la dorson de la amasoj.**

La limigo de la laborpezo por la homa estaĵo
devus esti la celo de la maŝino.
Honesta klopodo favore al la homo
kaj ne la avideco
devus esti ĝia celo.

*Kial ĉi tiu mirinda aplikita scienco,
kiu ŝparigas laboron kaj igas la vivon pli facila,
alportas al ni tiom malmulte da feliĉo?
La respondo estas simpla:
ĉar ni ankoraŭ ne lernis
uzi ĝin prudente.*

*Tio, kio plialtigas la homon
kaj riĉigas lian naturon
ne estas certe
la aplikoj de la scienca esplorado,
sed la instigo kompreni
la intelektan laboron de kreo kaj studo.*

*La tuta nia laŭdata
teknologia progreso,
nia civilizo mem
estas kiel hakilo
en la manoj de krima maniulo.*

*La prizorgo pri la homo kaj pri lia sorto
devas esti la supera intereso de la tekniko,
por ke la eltrovoj de nia menso
estu beno por la homaro.*

*Neniam forgesu tion,
inter viaj programoj
kaj viaj ekvacioj!*

*La terura malboniĝo
de la homa etika konduto,
mi opinias, hodiaŭ devenas esence
el la mekanikiĝo kaj malhumaniĝo
de nia ekzisto,
katastrofa kromproduktaĵo
de la evoluigo de la scienca
kaj teknika pensmaniero.*

Nia kulpo!

*Tamen mi estas firme konvinkita,
ke estas eble kaj verŝajne
igi la vivon de la homoj ĝenerale
inda esti vivata.
Ŝajnas, ke ekzistas
ĉiuj objektivaj kaj subjektivaj faktoroj por tio.*

Ne kredi, ke eblas
daŭra paco
signifas ne kredi je la sankteco
de la homa genro.
La metodoj adoptitaj ĝis nun
fiaskis,
ĉar mankis minimumo da sincereco
ĉe tiuj, kiuj klopodis tion.

Se la agnoskitaj ĉefoj de la homaro,
kiuj kontrolas la ilojn de la detruado
tute rezignus ilian uzon
plene konante la koncernajn implicojn,
oni povus atingi daŭran pacon.
Evidente ĉi tio ne eblas,
dum la grandaj ŝtatpotencoj ne rezignas
sian imperiistan programon.

Se ne estus avideco,
ne estus kialo por armado.

*Ĉiu ajn registaro estas,
en certa mezuro, malbono.
Sed monda regado
estas preferinda ol la malbono
ege pli fia
reprezentata de la militoj.*

*La sola savo por la civilizo
kaj por la homa raso
kuŝas en la kreado de monda registaro,
kiu starigu sur la juro
la sekurecon de la nacioj.*

*Ni devas lerni malfacilan lecionon
kaj tio estas:
la homaro havos viveblan estontecon
kiam niaj kondutoj
pri mondaj aferoj
baziĝos sur la justeco kaj sur la juro
kaj ne sur la minaco de la kruda forto.*

Unu afero estas certa,
se la freneza kuro al la armado daŭras,
nepre ĝi finiĝos
per tia masakro
kian oni neniam vidis en la historio.
Se estos venkanto,
la vera venko estos morto vivanta
por la nacio, kiu rezultos venkinta.

La neperforto
estas la plej granda forto,
je kiu disponas la homaro.
Ĝi estas pli efika
ol la plej potenca detruanta armilo
eltrovita de la homa genieco.
La detruo ne estas leĝo de la homoj.

Kie ajn ekzistas malakordoj,
ĉiufoje kiam vi estas fronte al kontraŭulo,
venku lin per amo.
En mia vivo mi agadis laŭ ĉi tiu simpla maniero.

Ĉi tio ne signifas,
ke ĉiuj miaj malfacilaĵoj estis solvitaj,
tamen mi vidis, ke ĉi tiu leĝo de la amo
efikis,
kiel la leĝo de la detruo
neniam faris.

Se ni amas tiujn, kiuj amas nin,
ĉi tio ne estas neperforto.
Neperforto signifas ami tiujn, kiuj malamas nin.
Mi scias kiom estas malfacila
ĉi tiu elstara leĝo de la amo.

Sed, ĉu la grandaj kaj bonaj aferoj
ne estas ĉiuj malfacile akireblaj?

Mia sperto,
kiu ĉiutage fariĝas pli forta kaj riĉa
instruas al mi, ke ne estas paco
por la uloj aŭ nacioj
se ili ne praktikas
la veron kaj la neperforton
per la plej granda kvanto ebla por la homo.

La politiko de la venĝo
neniam sukcesis.

*La perforto povis iafoje
rapide forigi la obstaklojn,
sed neniam ĝi pruvis
sian kapablon naski ion ajn.*

*Ĉiufoje, kiam eblas
solvi krizon
per racia solvo
mi estas favora al lojala kunlaborado aŭ,
se la cirkonstancoj ne ebligas tion,
al la metodo de Gandhi,
la pasiva rezisto.*

*La militrifuzanto estas revoluciulo.
Kiam li decidas malobei la leĝon
li forreziĝas siajn interesojn
por la plej grava celo
por engaĝiĝo favore al la plibonigo de la socio.*

La pasiva rezisto
estas universala glavo,
ĝi povas esti uzata en ĉiu okazo,
ĝi benas tiun, kiu uzas ĝin
kaj tiun, kontraŭ kiu ĝi estas uzata.

Sen verŝi unu sangoguton
ĝi atingas rezultojn el tre rimarkinda graveco.

Sed la malobeemo, por esti civila,
devas esti sincera, respekto plena, diskreta
neniam provoka
kaj ĉefe ne devas kaŝi rankoron aŭ malamon.
Jesuo Kristo kaj Sokrato
enpersonigis la formon plej puran
de pasiva rezisto aŭ animforto.

**La posedo de armiloj
subkomprenas elementon de timo,
se ne de malnobleco.**

Sed la vera neperforto ne eblas
se oni ne posedas aŭtentikan kuraĝon,
ĉar ĝi estas konscia kaj intenca bremsado
de la propra deziro revenĝi.

Oni levis la ideon,
fare de usonaj amikoj,
ke la atom-bombo,
pli bone ol ĉio alia,
kuntrenos la *ahimson*, la praktikon de neperforto kaj de la amo.
Oni subkomprenas tion supozante, ke ĝia detrua potenco
tiom indignus la mondon,
ke ĝi pormomente malproksimiĝas de la perforto.
Sed ĉi tio tre similas al homo,
kiu plenŝtopigas sin mem per dolĉaĵoj
ĝisnaŭze,
tiel ke li malproksimiĝas de ili
kaj poste simple revenas al ili kun duobligita fervoro,
kiam la efiko de la naŭzo tute malaperis.

Precize laŭ la sama maniero
la mondo revenos al la perforto
kun renovigita fervoro
kiam la efiko de la naŭzo
elĉerpiĝos.

*La bombon mi neniam prilaboris:
absolute ne!*

*Oni ne devas forgesi, ke la atoma bombo
estis konstruita en ĉi tiu lando (en Usono)
kiel deadmona armilo
por preventi la uzon
fare de la germanoj
en la kazo ke ili mem eltrovus ĝin.*

*Tamen mi ne kredas,
ke la civilizo estos detruata
dum milito batalata per atoma bombo.
Eble povos morti
du trionoj de la mondaj loĝantoj.
Sed saviĝos sufiĉa nombro da sentemaj homoj
kaj da libroj por rekomenci ĉion denove
kaj la civilizo povos esti rekonstruata.*

La moralo, kiun oni devas logike eltiri
el la plej granda tragedio de la atom-bombo,
estas, ke ĉi tiu ne estos detruata de kontraŭaj bomboj,
tiel, kiel perforto
ne povas esti detruata de kontraŭa perforto.

La malamon oni povas venki
nur per amo.
Kontraŭmetante malamon al malamo
oni nur pliigas
ĝian vastecon kaj profundecon.

*Mia pacismo estas instinkta sento,
sento, kiu loĝas en mi,
ĉar la murdo estas naŭziga.
Ĝi ne naskiĝas el intelekta teorio,
sed el profunda hororo
por ĉiu formo de malamo kaj de krueleco.*

*Tiuj, kiuj alte taksas la kulturajn valorojn
ne povas esti alia ol pacisto.*

*Laŭ mi
la celo de la pacismo estas atingebla
nur per supernacia regado.
Defendi senkondiĉe ĉi tiun celon
estas... la kriterio de la vera pacismo.
Miaj starpunktoj
estas preskaŭ tute la samaj de Gandhi.*

*Mi kredas, ke la problemo
atingi la mondan pacon
laŭ supernacia bazo,
estas solvebla nur
per la apliko de la metodo de Gandhi grandskale.*

*Se ni volas, ni povas havi antaŭ ni
daŭran progreson en prospero, kono kaj saĝeco.
Ĉu male ni volas elekti morton,
ĉar ni estas ne kapablaj
forgesi niajn kontrastojn?*

*Ni adresas petegon
kiel homaj personoj al homaj personoj:
memoru vian homecon kaj forgesu la ceteron!
Mi ne scias per kiuj armiloj oni batalos
la trian mondan militon.
Sed mi povas diri al vi,
kion oni uzos dum la kvara: ŜTONOJN.*

Mi ricevis multnombrajn leterojn
en kiuj oni petas min
esprimi opinion
pri la kontrasto inter araboj kaj hebreoj
en Palestino.

La ĝusta afero estas postuli
justan traktadon por la hebreoj
ĉie kie ili naskiĝis aŭ ili troviĝas.
La hebreoj naskitaj en Francio estas francoj
ĝuste kiel estas francoj,
la kristanoj naskitaj en Francio.

Tamen religian agadon
oni ne povas realigi
helpe de la bajonetoj kaj bomboj.
La hebreoj povas enlokiĝi en Palestino
nur per la konsento de la araboj.
Ili devas klopodi konverti
la koron de la araboj.

La koro de la araboj
estas regata
de la sama dio,
kiu regas la koron de la hebreoj.

La hebreoj devas sin turni al la praktiko de la neperforto
rilate la arabojn.

Ili trovos la publikan mondan opinion
solidara kun ilia religia sopiro.

Mi ne intencas defendi la ekscesojn
faritajn de la araboj.

Mi volus, ke ili elektu
la metodon de la neperforto
por rezisti
kontraŭ tio, kion ili ĝuste taksas
maljusta atako
kontraŭ sia lando.

Sed oni povas diri nenion
kontraŭ la rezisto de la araboj
fronte al la superaj kontraŭstarantaj fortoj.
Estas necese ke la hebreoj,
kiuj sin deklaras la elektita raso,
elmontru ĉi tiun sian titolon,
elektante la metodon de la neperforto
por konfirmi sian staton en la mondo.

Ĉiuj landoj,
inkluzive de Palestino,
iĝos ilia patrujo,
sed ne dank' al agreso,
sed al servado farita kun amo.
Tiel ili povos aldoni
al la multaj kontribuoj,
kiujn ili donis al la mondo,
la plej altan kontribuon
de la agado neperforta.

Hartijan, la 2an de Novembro 1938

*La rilato kun la hebrea popolo
fariĝis mia pli forta humana ligo
ekde kiam mi tute konsciis
pri nia malcerta situacio
inter la nacioj de la mondo.*

*Israelo estas la sola loko en la mondo,
kie la hebreoj povas
doni formon al la publika vivo
laŭ siaj propraj tradiciaj idealoj.*

*La hebreoj de Palestino
ne batalis
por la politika sendependeco per si mem,
sed por akiri liberan enmigradon de la hebreoj
el multaj landoj,
kie ilia ekzisto mem estis en danĝero.*

*Ni hebreoj havas la devon
meti je dispono de la mondo
nian malfeliĉan plurjarmilan sperton
kaj, fidelaj al la moralaj tradicioj de niaj patroj,
fariĝi soldatoj de la pac-batalo
kune kun la plej noblaj konoj
de ĉiu kultura kaj religia kadro.*

*Se ni ne kapablas atingi
honestan kunlaboradon
kaj honestajn paktojn kun la araboj,
tio signifas, ke ni lernis nenion
pri niaj dumil jaroj da suferoj
kaj ni meritas ĉion, kio okazos al ni.*

*Mi preferus racian interkonsenton kun la araboj,
surbaze de paca kunvivado,
prefere ol la kreo de hebrea ŝtato.
Laŭ mia konsidero pri la esenco de judismo,
mi rifuzas la ideon de hebrea ŝtato
kompleta de landlimoj, de armeo
kaj de kelka surtera regado.*

*La reveno al nacio
en la politika signifo de la vorto
signifus malproksimiĝon de la religio,
kiun la genio de niaj profetoj
inspiris en nian popolon.*

*Mi esperas, ke iom post iom
estos starigitaj rilatoj kun la araba popolo,
surbaze de fruktodona kunlaboro,
de respekto kaj de reciproka fido.
Fakte ĉi tiu estas la sola rimedo
per kiu la du popoloj
povos atingi la veran sendependecon
el la ekstera mondo.*

*La sinteno de la hebrea popolo
rilate la araban popolon
konigos la veran dimension de ĝiaj moralaj
horizontoj.*

Se mi povas ĝin diri tutsimple
kaj kun deviga humileco,
mia mesaĝo kaj miaj metodoj
estas validaj laŭ sia esenco
por la tuta mondo,
kaj por mi estas kaŭzo de viva kontentiĝo
scii, ke ili jam estigis respondon
en la koro de granda kaj ĉiam kreskanta numero
da viroj kaj virinoj eĉ en Okcidento.

Se mi estus tiu, kiu mi volas esti,
mi ne bezonus diskuti kun iu ajn.
Sed mi kun sufero konscias pri miaj limoj.

Mia menso estas limigita,
mi ne legis multajn literaturajn verkojn,
mi ne vidis multon pri la mondo,
mi koncentriĝis
pri iaj aferoj de la vivo
kaj, preter ĉi tio,
mi ne havas aliajn interesojn.

Mi havas neniun dubon,
ke ĉiu ajn viro kaj virino
povus fari ĉion, kion mi faris,
se ili efektivigus la saman streĉadon
kaj kultivus la saman esperon kaj la saman fidon.

Mi havas nenion novan
por instrui al la mondo,
la vero kaj la neperforto
estas malnovaj kiom la montoj.

Kaj ne nomu min
Mahatmo,
mi ne estas granda animo.
mi estas nur Gandhi.

*En la tragika situacio, antaŭ kiu troviĝas la homaro,
ni opinias, ke la sciencistoj
devus kunveni en kongreson
por certiĝi pri la danĝeroj
devenantaj el la evoluo de amas-detruaj armiloj.*

*Ni petas vin, se vi povas,
konsideri vin nur kiel biologia specio,
kies malaperon neniu inter ni povas deziri...*

*Konsiderinte,
ke en ĉiu estonta monda milito
estos certe uzataj
atomaj armiloj,
kaj ke tiaj armiloj
ne certigas la daŭrigon de la homa ekzisto,
ni adresas urĝan petegon
al la tutmondaj regantoj,
por ke ili ekkonsciu
kaj publike agnosku,
ke iliaj celoj ne povas esti atingitaj
per monda milito,
kaj konsekvence ni invitas ilin
serĉi pacajn rimedojn
por solvi ĉiujn malakordojn.*

*La grava afero
estas neniam ĉesi sin pridemandi...*

*Karaj posteuloj,
se vi ne fariĝis
pli justaj kaj pacamaj
kaj ĝenerale pli raciaj
ol ni estas (aŭ estis),
tiukaze iru al la diablo!
Per ĉi tiu mia bondeziro,
mi estas (estis), via*

Albert Einstein

Oni dankas:

- la eldonejo de la itallingva originalo MC Editrice, www.mceditrice.it
por la afabla rajtigo al traduko kaj publikigo.
- la Milana Esperanto-klubo “*Circolo Esperantista Milanese*”
(<http://milano.esperantoitalia.it/>)
- kaj la Itala Katolika Esperantista Unuiĝo “*Unione Esperantista Cattolica Italiana*” (<http://www.ueci.it/>)
por la kontribuo al presado.

Oni povas legi kaj elŝuti la verkon ĉe:

<http://www.ueci.it/eldonoj/verkoj/GandhiEinstein.pdf>

Dialogo – neniam okazinta – inter Gandhi kaj Einstein pri la granda temo de la paco.

Leginte paralele verkojn, pensojn, paroladojn, leterojn de **Gandhi** kaj **Einstein** oni travidas densan, inteligentan, serenan intrigon eĉ en la mallumo de la tempoj; la etoso estas malpeza, brila, foje ironia.

La paco ne identiĝas nek elĉerpiĝas en politika idealo kaj ne povas esti rezulto de ununura kulturo.

Raion Pannikar skribas, ke ambaŭ Gandhi kaj Einstein estis pensuloj, kiuj kultivis la veran vivo-saĝon. Ili simple parolis kiel du homoj. Ankaŭ en ĉi tio ili estis majstroj kaj montras al ni la vojon.

Mohandas Karamchand Gandhi (1869 – 1948)

Albert Einstein (1879- 1955)

Nuvola de Capua, verkistino de tekstoj kaj tradukoj por la enscenigo de aŭtoroj antikvaj kaj modernaj, estis ĉiama kunlaborantino de la aktoro Carlo Rivolta.

De kiam ŝia kunulo de vivo kaj laboro plu ne estas ĉe ŝi, ŝi daŭrigas kun persista espero vivi la vortojn kaj la pensojn de la politika kaj civila Teatro naskiĝinta el ilia komuna elserĉo.

LA TRADUKO EN ESPERANTON DE ĈI TIU VERKO INTENCAS OMAĜI AL **LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF** (1859-1917), KIU KREIS ĈI TIUN LINGVON POR LA INTERKOMPREENO INTER ĈIUJ POPOLOJ KAJ DEDIĈIS SIAN TUTAN VIVON AL LA IDEALAJ DE PACO KAJ FRATECO.

